# Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270

**2021.6**


**La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn**



## Estimataj gelegantoj

Denove proksimiĝas fino de la jaro – tempo kiam oni bilancas pasintan jaron, kio okazis, kion ni sukcesis fari, kion ni ne faris ktp.
La pasinta jaro estis jam la dua dum kiu nian vivon influis malagrablaĵoj eĉ danĝeroj kaŭzitaj de nova malsano. Estas strange, ke ne ĉiuj homoj konscias tiun danĝeron kvankam ĝi estas evidenta se vi rigardas situacion en la tuta mondo. Inter homoj cirkulas diversaj famoj pri vakcinado, kiel ĝi estas senefika, damaĝema eĉ intence infektigita por influi homaron. Mi konscias, ke ekzistas kazoj, kiam ne estas eble vakcini certajn unuopulojn pro diversaj medicinaj kaŭzoj, tio estas komprenebla, sed imagu kiel granda nombro de homoj en diversaj landoj ne deziras esti inokulitaj ĉar ili kredas al fiteorioj.

Eble la venonta jaro alportos plibonigon en tiu ĉi afero kaj ni povos denove kunveni, vojaĝi kaj vizitadi amasajn aranĝojn sen restriktoj kaj malhelpoj.

La fino de la jaro estas ankaŭ tempo por fari planojn por la venonta jaro. Ni estu optimistoj kaj esperu, ke venos tempoj pli taŭgaj por niaj aktivecoj en normala reĝimo. Sed ne forgesu, kion ni eklernis dum pasinta tempo – retajn kontaktojn kaj telekunvenadon, ilin ni povas avantaĝe eluzi ankaŭ dum „normalaj tempoj”.

Por la venonta jaro mi deziras al vi trankvilan vivon, feliĉajn travivaĵojn inter viaj proksimaj kaj firman sanon.






**Via redaktoro**

# Enhavo:

Resuma jarraporto de la landaj asocioj de IFEF pri la jaro 2020 ............................ 104
*Connecting Europe Express* ............................................................................ 108
Bonvenon al la 73-a IFEF-kongreso en *Beroun* .................................................... 110
Tago de fervojo 2021 de Ĉeĥaj Fervojoj .............................................................. 111
Eksprestrajno konektanta Eŭropon ..................................................................... 112
Eŭropaj fervojoj: historio – nuntempo - estonteco ............................................... 115
Novaj lokomotivoj por Nov-Zelando..................................................................... 116
Trajno sen kondukisto prezentita sur *Hamburg S-Bahn* ....................................... 117
Malfacilaĵoj kun rezervado de internacia trajno .................................................. 118
Jarkunveno de ĈeFEA.......................................................................................... 119
Enhavo 2021 ....................................................................................................... 120
Titolpaĝo: Hotelo *Grand* en *Beroun,* venonta kongresejo

**Internacia Fervojisto**
Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro
Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

**Estraro de IFEF**
**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) prezidanto@ifef.net
**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) sekretario@ifef.net
**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) kasisto@ifef.net
**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) redaktoro@ifef.net
**Gvidanto de la Faka Komisiono:** momente neokupita

**Membroj de la Redaktora Komisiono**
Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

**Membroj de la Faka Komisiono**
Guido Brandenburg (Germanio), ts@ifef.net
Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), fas@ifef.net

**Bank-Konto:**
**Nomo:** „Laurent Vignaud”
**IBAN:** FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237
**BIC:** PSSTFRPPNTE

**UEA-konto:** iffk-o

**Retejo**: www.ifef.net
**Facebook:** https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372

# Resuma jarraporto de la landaj asocioj de IFEF pri la jaro 2020

I.F.E.F. Sekretariejo

(Antaŭrimarkigo: La ordo de la raporto estas kiel tiu de la lastaj jaroj por faciligi komparojn.)

La landaj asocioj de IFEF, surbaze de la dissendita demandilo, preparis siajn jarraportojn pri la jaro 2020. Ne venis raporto de Ĉinio, Hispanio, Kubo kaj Pollando. En la jaro 2020 (re)aliĝis al IFEF 2 novaj asocioj, amikoj de fervojistoj, en Belgio kaj Hispanio. Danio ĉesis la agadon la 31-an de Decembro 2020.

En la jarfino de 2020 ekzistis 16 landaj asocioj de IFEF, jene: Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kroatio, Kubo, Pollando, Rumanio, kaj Slovenio. IFEF havas individuajn membrojn en Israelo, Koreio, , Nederlando, Norvegio, Rusio, Slovakio kaj Svedio.

**1. La landaj asocioj**

La landaj asocioj raportas pri 790 asociaj membroj (kun la 8 I.M.), kiuj estas kun 81 malpli ol en la antaŭa jaro.

Se ni ekzamenas la lastan jardekon la tendencon de la malkresko de la membro-nombro de fervojistaj esperantistoj, ni povas konstati ke en ĉiu jaro grave malkreskis tiu nombro. La membro-nombro en la jaro 2005 estis 2310, en la jaro 2010 estis 1710, en la jaro 2015 estis 1069.

Laŭ la jarraportoj 3 landoj havas malpli ol 10 membrojn, 9 landoj havas inter 10 kaj 50 membrojn, 3 landoj havas inter 51 kaj 100 membrojn, kaj 1 landa asocio havas pli ol 100 membrojn. Inter ili ni povis konstati ke 131 estas aktivaj fervojistoj, 243 emeritaj fervojistoj, 18 iamaj fervojistoj, 393 ne-fervojistoj.

En multaj landoj estas E-kluboj en diversaj urboj, sume 21.

Laŭ la kotizoj IFEF nombras en 2020 (kun la 8 IM) 275 membrojn, kiuj estas 1 membro malpli ol en la antaŭa jaro.

Se ni komparas dum la pasinta jardeko la membro-nombron de IFEF laŭ la pagitaj kotizoj, la rezulto montras konstantan malkreskon. En la jaro 2001 la membro-nombro de IFEF estis 992, 2005 estis 718, 2010 estis 515, 2015 estis 313.

En multaj landoj la pagitaj IFEF-membro-kotizoj estas malpli ol la enlandaj membroj. Danio pagis membro-kotizojn pli ol la realaj membroj.
La raportoj indikas ke la plej granda parto de la membroj estas emerituloj (497), la aktivaj membroj estas 158, la emeritaj fervojistoj estas 243, la aktivaj fervojistoj 131, la iamaj fervojistoj 18. La amikoj de fervojo (ne fervojistoj) nombras 393.
**2. Taskoj de la landaj asocioj**
Preskaŭ ĉiuj landaj asocioj agadis laŭ la akceptita laborplano kaj kolektis indikojn pri la historio de la landa fervojista Esperanto-movado. Laŭ ties indikoj estis prilaborita la Suplemento pri la Historio de IFEF inter 2000 – 2019 okaze de la 110-a jariĝo de la fervojista internacia movado.
**3. Interrilatoj kun instancoj kaj aŭtoritatoj**
Sep landoj raportas pri interrilatoj kun la fervoja administracio, plej parte ne regulaj. El ili unu asocio dum la jaro ricevis apogon, kelkaj ricevis senpagan bileton por oficiale vojaĝi al kongresoj kaj aliaj Esperanto-eventoj, kelkaj landaj asocioj senpage ricevis specialan ejon por kunveni. Naŭ tute ne havas rilatojn kun la koncernaj fervojaj administracioj.
Nenie plu troviĝas Esperanto-klarigo kaj instrukcioj en oficiala fervoja horaro, fervojaj kompanioj preskaŭ ne plu eldonas horarlibron, ĉio estas en la reto, eĉ en pluraj lingvoj.
Tri landaj asocioj havis regule kontaktojn kun sindikatoj, sep neniun, la aliaj ne rekte aŭ nur en specifaj okazoj.
Du landaj asocioj (Kubo, Slovenio) ne havis rilaton kun landa *FISAIC*-sekcio, ĉar tie ne (plu) ekzistas. Kvar landaj asocioj ricevis financan subvencion aŭ alian helpon de la landa *FISAIC*-sekcio. Kvar landaj asocioj havas oficon en la *FISAIC*-organizaĵoj.
Sep landaj asocioj havis kontaktojn kun libertempaj, kulturflegantaj, artaj, sportaj aŭ religiaj organizoj, 1 nur foje, 4 neniun.
**4. Organizado de jarkunvenoj kaj aliaj renkontiĝoj**
En preskaŭ ĉiuj landoj ne okazis jarkunveno en la jaro 2020 pro limigoj de la pandemio, en kelkaj okazis nur reta ĝenerala asembleo, tri sukcesis fizike kunveni. Entute 70 partoprenantoj ĉeestis dum la

jarkunvenoj, kun 2 eksterlandaj gastoj. En kelkaj jarkunvenoj okazis fakprelegoj aŭ distraj programoj.

Kvin landoj (Ĉeĥio, Francio, Germanio, Kroatio, Slovenio) aranĝis rete aŭ partoprenis fervojistan Esperanto-renkontiĝon.

**5. Interrilatoj kun Esperanto-organizoj**

Laŭ la raportoj ĉiuj landaj asocioj havis interrilatojn kun sia landa asocio de UEA.

Ĉiuj asocioj havis bonajn interrilatojn kun aliaj Esperanto-organizaĵoj.

Entute UEA havas 21 IFEF-fakdelegitojn kaj 3 delegitojn fervojistajn (ne IFEF-membroj) el 12 landoj.

**6. Informado en la plej vasta senco**

La fervojistaj esperantistoj en 4 landoj (Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Slovenio) aranĝis ekspozicion; Ĉeĥio, Hungario kaj Slovenio dum pluraj okazoj. En 6 landoj oni plenumis kromajn aktivecojn (flugfolioj, afiŝoj, retpaĝoj, ktp).

Ses landaj asocioj en propra medio informis la publikon pri Esperanto-eventoj kaj movadaj aktualaĵoj pere de fervojistaj gazetoj kaj aliaj fakaj kaj publikaj regionaj ĵurnaloj, aŭ rete.

Kvin landaj asocioj (Danio, Francio, Italio, Kroatio, Slovenio) raportas pri faritaj fakprelegoj kaj fak-artikoloj.

Sep landaj asocioj tradukis nacilingve la informilon pri IFEF kaj ses sendis al siaj membroj la ligilon al la filmo pri klarigoj de IFEF. Inter la membroj kelkaj sendis artikolojn por IF, entute 33. Sep landaj asocioj petis pri aligo de siaj membroj al la IFEF-foruma listo.

**7. Instruado**

Sep landaj asocioj raportas pri la organizado de 9 Esperanto-kursoj, plue seminarioj kaj staĝoj, konversaciaj aŭ korespondaj (ankaŭ rete); ne okazis en Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Danio, kaj Kroatio. Entute partoprenis 97 kursanoj, el kiuj 8 estas fervojistoj.

La lingvokursoj estis memstaraj en kvar landoj, kaj tri landoj aranĝis ilin komune kun la landa aŭ loka Esperanto-asocio aŭ aliaj Esperanto-organizoj. Kvin landaj asocioj klopodos (celos) organizi kursojn ĉiun jaron.

**8. Junulara agado**

Tri landaj asocioj (Ĉeĥio, Germanio, Hungario) raportas pri entute 15

junaj membroj (ĝis 30-jaraĝo). Memstara junulgrupo ne ekzistas.

9. Landaj organoj

En la jaro 2020 kvin landaj asocioj eldonis propran organon. En Germanio kaj Hungario aperis 4 foje; en Francio 3 foje, en Italio, Danio, 2 foje; entute 15 bultenoj. La nombro de la jara paĝo estis 288, laŭlande ĝi varias inter 24 kaj 104 paĝoj en formato A5 kaj A4. Du landoj eldonis ĝin sole en Esperanto, la aliaj dulingve kaj ĉiuj sendas ĝin ĉu rete, ĉu papere. Ses landoj havis spacon en aliaj organoj, kiam venis okazo.

**10. Faka agado**

Sep landaj asocioj (Ĉeĥio, Danio, Francio, Germanio, Italio, Kroatio, Rumanio) raportas pri la agado en la terminara laboro kaj pri faka aktiveco, pri verkado kaj traduko de fakaj tekstoj kaj materialoj, pri ili interesiĝas 12 personoj. FAS dum la jaro prizorgis pri la retaj prelegoj, ili okazis dum la IFK, kunveno de ĈeFEA, UK de UEA, KAEST2020. Kroatio prezentis prelegon dum fizika kunveno.

**11. Financoj**

En preskaŭ ĉiuj landoj nur la enpagitaj jarkotizoj provizas la asocian kason, kelkaj ricevas malgrandajn subvenciojn kaj nur per la redukto de la elspezoj povis ekvilibrigi la financan staton. Sed la situacio estis sufiĉe bona aŭ kontentiga, ili havis modestan ekvilibron.

**12. Fina komentario**

La situacio de la fervojista Esperanto-movado estas pli-malpli la sama kiel en la pasinta jaro. Bedaŭrinde la majoritato de la membroj de IFEF rigardas pasive la agadon de la Federacio, krom la preteco de nur kelkaj membroj de la landaj asocioj (ĉiam la samaj) kiuj plenumas diversajn taskojn.

Sed ĝenerale la federacio kaj la estraro bone funkcias kaj por la eksteruloj ĝi aperas agema.

La pasinta jaro ebligis kaj devigis nin renkontiĝi alimaniere ol kutime. Fakte pro la malebleco kunveni fizike, IFEF-membroj havis plurajn okazojn kunveni rete. IFEF organizis aŭ partoprenis plurajn renkontiĝojn kun sukceso. Tiu ĉi sperto montras ke la novaj komunikrimedoj povus nur helpi nian federacion.

Pro tio mi opinias ke ĉiam pli ni devas ĉeesti en la reto por diskonigi

IFEF-n kaj la agadon de fervojistaj esperantistoj. Eble ni ne akiros novajn fervojistojn aŭ membrojn, sed ni povus havi pli multajn amikojn de fervojo el la tuta mondo.
Ĉiuj landaj asocioj dum ĉi tiu jaro uzis la reton por komuniki kun siaj membroj, por tiuj kiuj ne havas retaliron la telefonalvoko restas la sola kontaktilo. Sed ĝi estis utila ĉefe por ne soligi la plej maljunajn membrojn, la aliaj bone adaptiĝis al uzado de komputilo kaj ĝi permesis al ili partopreni novajn kunvenojn kaj havi rilatojn kun esperantistoj en la mondo.
Dum la jaro IFEF „semis” en pluraj direktoj, pro tio ni esperas ke venos novaj freŝaj fortoj. Tamen laŭ la membrostato de la Federacio, en komparo kun aliaj UEA-asocioj, IFEF restas ĉiam unu el la plej grandaj kaj agemaj asocioj. Kadre de UEA, IFEF havas gravan rolon kaj ĝi estas respektinda kaj respektata.
*Bologna*, la 20-an de Aprilo 2021
**Vito TORNILLO, IFEF-sekretario**

## *Connecting Europe Express*



Foto: Jan Niemann

Ĉu oni (la Eŭropaj trafik-ministroj kaj la Eŭropaj fervojoj) vere volas tion?

Post hodiaŭa vizito en *København H* (la centra staci-domo de Kopenhago) en la halo super ĉiuj trakoj en la angulo plej proksime de kajo 1, je kiu ĉe trako 1 paŭzis bela blua trajno (koloro de EU) tirata de sambela ruĝa elektra lokomotivo (tipo *EB* laŭ nomo de ĝia posedanto *DSB* – laŭ produktanto *Siemens* ĝi estas tipo Vectron), mi VERE dubas.

Kial? Ĉar malantaŭ la blua kovrilo kaŝas sin pasaĝervagonoj, kiuj jam estis ’sur Eŭropaj reloj’ dum 5-15 jaroj – mi kontrolis la liveradŝildojn ĉe la enirpordoj ĉe pluraj el la vagonoj, kaj montriĝis, ke ili ĉiuj estas konstruitaj inter 2004 kaj 2012! Kaj la materialoj kaj dezajno bazas sur ideoj de la jarmil-ŝanĝo…

Do, mi vere sentis, ke mi spektas novan version de la fabelo de H. C. Andersen: „La novaj vestaĵoj de la imperiestro” – iom alie, ĉar la

vagonoj portas bluan EU-kovrilon – en Danio ni bedaŭrinde nur havas anglan esprimon por tiu fenomeno/farado: *Monkey Shine* (Esperante pli-malpli signifas ŝminkita kadavro).

Certe mia impreso estas kolorigita de miaj propraj mult-multaj trajnvojaĝoj en Eŭropo dum la lastpasintaj pli ol 45 jaroj, sed ankaŭ fortigita de miaj impresoj ĉe Innotrans (kie oni kutime montras verajn fervojajn novaĵojn). Sed ankaŭ la aspekto de „la ekspozicio" en la halo vere fortigis tiun impreson – 5-6 standardoj ĉe malgrandaj rondaj tabloj, kie staris unu aŭ du reprezentantoj de diversaj firmaoj kaj institucioj, kiuj (laŭ ili) volas konekti Eŭropon – estis *DSB*, *DB Cargo*, la eŭropa konsumant-protekta organizo ĉe unu flanko kaj ĉe la alia du/tri danaj medi-/naturprotektaj asocioj. Ĉiuj venis SEN iuj konkretaj prospektoj/ideoj, kiel ili vidas la eblon vere konekti Eŭropon.

Neniu el la firmaoj povis montri al mi retpaĝon por mendo de vojaĝoj en tuta Eŭropo, kio laŭ mi estas necesa kaj grava paŝo al la celo konekti Eŭropon. Kun tia reklamado oni ne allogas homojn. Ni, kiuj konas fervojon, ne vidas ion „novan, interesan, modernan" …

Kaj kiam la dana ministro pri transporto apud la blua trajno komencis „ellasi varman areon" mi rapide kaj tre seniluziigita iris al la alia flanko de la kajo, ĉar ĉe trako 2 ĵus alvenis konata „fera amiko" – siatempe, kiam mi deĵoris, ĝi estis „mia trajno": *Øresundståget* venis de Svedio, kaj post laŭhorara 5-minuta paŭzo mi estis denove survoje hejmen.

Certe vi, kiuj konas min, komprenas mian seniluziiĝon, kiam mi rakontas, ke ni nur faris UNU foton de tiu „evento".

Mi do vere ĝojas, ĉar propono, ke IFEF entrajniĝu en la CEE-trajno, ne realiĝis. Ni restu fidindaj fervojistoj, kiuj konas kaj komprenas nian realan mondon – fervojon – kaj espereble daŭre klopodos ne eniri en „la varman aeron" de politikistoj. La sola problemo por ni tiu-kaze estas, ke ili (politikistoj kaj iliaj deĵorantoj ofte sen scio pri „veraj fakoj") sin intermiksas tro.

Vere personaj rimarkoj de eterna fervojisto, kiu havas memorojn de la tempo, kiam la fervojo vere konektis Eŭropon, eble ne ekspresе sed do reale!

**Jan U. NIEMANN**, iama trajnestro

# Bonvenon al la 73-a IFEF-kongreso en Beroun

Venontjara IFEF-kongreso okazos en la tagoj inter la 6-a ĝis 11-a de Majo 2022 en mezbohemia urbo *Beroun* (Ĉeĥio) tute proksime de Prago. La kongreso okazos en hotelo *Grand Litava*, kiu troviĝas en la centro de la urbo ĉirkaŭ unu kilometron de la stacidomo. La hotelo *Grand* estas komforta hotelo kun unu- kaj dulitaj ĉambroj, kun diversgrandaj salonoj kaj salonetoj, restoracio, parkejo kaj aliaj hotelaj servoj.

La loka kongresa komitato preparas por vi allogan programon, en kiu



Beroun, Placo de Hus

krom kutimaj IFEF-kunvenoj vi trovos interesajn fakajn prelegojn, ekskursojn, kulturajn kaj amuzajn programerojn.

Post la kongresaj tagoj sekvas postkongreso, kiu okazos en la urbo Pardubice en orienta Bohemio. Dum restado en tiu bela historia kaj samtempe moderna urbo vi vizitos interesajn lokojn en orienta Bohemio. Aliĝilon kun provizora programo vi povas trovi en ĉi tiu numero de la Internacia Fervojisto kaj sur retpaĝoj de Ĉeĥa Fervojista Esperanto Asocio http://kongreso.wz.cz/.

Pliajn informojn pri kongresloko kaj postkongreso vi trovos ankaŭ en http://ifef.free.fr/IFK2022/IFEF-73a-IFK-2022-Informilo.pdf

**Ladislav KOVÁŘ**

Kongresa n-ro

# A L I Ĝ I L O

por la 73-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) arangîta de ĈeFEA en tagoj inter 6-a Majo kaj 11-a Majo 2022 en Beroun, Ĉeĥio

Adreso de LKK: Český železničářský esperantský svaz, Bratří Hubálků 161, 560 02 Česká Třebová, ČR. tel., +420 602483265; kongreso@atlas.cz, http://kongreso.wz.cz/

Bank-konto: Raiffeisenbank, a.s., Odborové sdružení železničářů; Kontonumero: 1003019756/5500; IBAN: CZ18 5500 0000 0010 0301 9756; B.I.C: RZBCCZPP

Varia simbolo: **400490**

Mi aliĝas al 73-a IFEF-kongreso, Beroun, Ĉeĥio, 6.5. – 11.5. 2022

S-ro ☐ S-ino ☐ IFEF-membro ☐ Vegetarano ☐ Handikapulo ☐

Familia nomo ............................................ antaŭnomo........................................

Adreso: strato kaj numero......................................... urbo......................................

Lando ....................................... poŝtkodo .................... naskiĝjaro .......................

Telefono: ..................................Retadreso: ..........................................

| Kongreskotizoj | ĝis 31.12.2021 | ekde 01.01.2022 | sumo |
|---|---|---|---|
| Kongresano (IFEF-membro) | € 40 | € 60 | ................ |
| IFEF-membro loĝanta en B-landoj laŭ UEA-difino, familiano kaj junulo/ino ĝis 30 jaraĝa, | € 20 | € 30 | ................ |
| Kongresano (ne IFEF-membro) | € 60 | € 80 | ................ |

Servoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| Tranoktadkosto minimume por unu nokto laŭ elektita kategorio (plej malfrue ĝis la 31.12. 2020) | | | ................ |
| Urbovizito Beroun piede | D1 | € 5 | ................ |
| Vizito vitrofabriko Nižbor kun tagmanĝo (buse) | D2 | € 30 | ................ |
| Faka vizito (Centra regadejo) Praha (trajne) | F | € 12 | ................ |
| Tuttaga ekskurso Křivoklát, Lužná (tagmanĝo) | T | € 60 | ................ |
| Festa vespero (sen vespermanĝo) | € 0 | | ................ |
| Ĉambroperado | € 0 | | ................ |
| Postkongreso | € 280 | | ................ |
| | Sume | | ................ |

Loko, dato:............................................. Subskribo:..............................................

Kongresa numero:

# Ĉambro - mendilo

Por la 73-a Kongreso de IFEF, Beroun, Ĉeĥio,
la 6-an de Majo ĝis 11-an de Majo 2022

S-ro ☐ S-ino ☐ (skribu majuskle)

Familia nomo: ..................................................... Antaŭnomo:................................

Strato kaj numero:................................................. Loĝloko:......................................

Lando:................................................................. Poŝtkodo: ...................................

Mi deziras loĝi kun: ...........................................................................................

Mi mendas ĉambron en hotelo: ..........................................................................

| Noktoj (Majo 2022) | 6/7 | 7/8 | 8/9 | 9/10 | 10/11 | 11/12 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | |

## La prezoj estas por unu nokto kaj unu persono

| | | kun matenmanĝo | | kun maten- kaj vespermanĝo | |
|---|---|---|---|---|---|
| Hotelo Grand | 1 lito en 1-lita ĉambro | € 52 | | € 67 | |
| | 1 lito en 2-lita ĉambro | € 32 | | € 47 | |
| | | | | | |

Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la Ĝeneralaj instrukcioj kaj aparte mi deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restado en Ĉeĥa respubliko dum la 73-a IFEF-kongreso kaj postkongreso, kaze ke mi partoprenos ankaŭ ĝin.

Mi venos al Beroun per ............................. la ...........-an de Majo je la .......-a horo.

Loko, dato:................................. Subskribo:........................................

Provizora programo de la 73-a IFK, Beroun,
6.5.- 11.5.2022 kaj postkongreso

| | |
|---|---|
| 6.5.2022 (vendredo)<br><br>- alveno de gepartoprenantoj<br>15:00 - kunveno de estraro IFEF/LKK<br>16:00 – IFEF-estrarkunveno<br>19:00 - interkona vespero | 10.5.2022 (mardo)<br><br>9:00 - tuttaga ekskurso T<br>20:00 - nacia vespero |
| 7.5.2022 (sabato)<br><br>10:00 - solena malfermo de la kon-greso<br>14:00 - fake aplika komisiono<br>14:30 - fakaj prelegoj<br>16:00 - ekumena diservo<br>20:00 - koncerto | 11.5.2022 (merkredo)<br><br>9:00 - ekskurso D2<br>9:00 - faka ekskurso F<br>14:00 - movadaj aferoj<br>16:30 - solena fermo de la kongreso |
| 8.5.2022 (dimanĉo)<br><br>9:00 - prelego pri urbo Beroun<br>10:00 - prezento de la 74-a IFK 2023<br>10:00 - prezento de ĈLA FISAIC<br>14:00 - ekskurso Beroun D1<br>20:00 - komuna vespero (bufedo, tombolo) | 12.5.2022 (ĵaŭdo)<br>- forveturo al postkongreso<br>- promeno en urbo Pardubice<br><br>13.5.2022 (vendredo)<br>- vizito de urboj Litomyšl (en UNESCO listo) kaj Svitavy (E-muzeo) |
| 9.5.2022 (lundo)<br><br>8:30 – gazetara konferenco<br>9:00 - publika plenkunsido<br>14:30 - terminara komisiono<br>15:30 - ĉefprelego<br>20:00 - koncerto | 14.5.2022 (sabato)<br>- vizito de urboj Hradec Králové (muzeo de sekuriga kaj komunika tekniko), Třebechovice (ekspozicio de betlehemfiguraro)<br><br>15.5.2022 (dimanĉo)<br>fino de la postkongreso, forveturo hejmen |

**ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ**

1. Ĉiu partoprenanto, eĉ familianoj, plenigos legeble apartan aliĝilon por la kongreso kaj por la postkongreso kaj sendu ĝin al la adreso de LKK.

2. La pagon inkluzive bankelspezojn sendu al la indikita bank-konto en eŭroj plej malfrue ĝis la 31-a de Decembro 2021.

3. Se vi pagos por alia persono (surbaze de aparta aliĝilo), menciu la ĝustajn detalojn pri la aliĝinta persono (nomo, lando, adreso).

4. La aliĝilo estos akceptita de LKK nur post ricevo de la pago. LKK tiam konfirmos la aliĝon kaj indikos la kongresnumeron kaj ĉiujn antaŭmenditajn kaj antaŭpagitajn servojn. La konfirmleteron bonvolu nepre kunporti al la kongreso.

5. La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la kongreson. La antaŭpagitaj sumoj por servoj estos repageblaj post la depreno de 10 % por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 31-a de Marto 2022.

6. LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn, se inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj postulos tion.

7. La prezon por tranoktado estas necese pagi por minimume unu aŭ por ĉiuj menditaj noktoj plej malfrue ĝis 31.12. 2021. Sen ricevo de la pago ne estos certigita la tranoktado. Kaze de malmendo de tranoktado antaŭ la 31.3.2022 estos redonita la tranoktpago escepte de la unua nokto laŭ kondiĉoj de la hotelo.

8. LKK certigas prezon de loĝado kaj nombron da lokoj ĝis la 31.12.2021. Post tiu dato povas okazi ŝanĝoj en la prezo kaj loko por loĝigo.

9. Se vi mendas unu liton en 2-lita aŭ 3-lita ĉambro, nepre indiku kun kiu vi volas loĝi. Alie LKK decidos pri kunloĝanto.

10. Dum registrado ĉe la alveno, post kontrolo de menditaj servoj, la partoprenanto ricevos nomŝildon kun indikita nomo kaj kongresnumero.

11. Parkado ĉe Hotelo Grand – senpaga (se estas libera loko), en garaĝo kostas – 250,- CZK por unu nokto. Ili estas pagendaj surloke.

12. Deklaro pri protekto de personaj datenoj:

Mi „konsentas“ „ne konsentas“ pri publikigo de mia retadreso en la listo de kongresanoj. Forstreku ne deziratan elekton.

# Tago de fervojo 2021 de Ĉeĥaj fervojoj





Nunjara tradicia evento okazis dum la tagoj inter 17-a ĝis 19-a de Septembro en Fervojmuzeo en *Lužná u Rakovníka.* Organizanto de la aranĝo estis Ĉeĥaj Fervojoj a.s. kun Fervoja Esplorinstituto. Sian lokon tie trovis, kiel kutime, ankaŭ ekspozicioj de diversaj grupoj de Ĉeĥa Landa Asocio de *FISAIC*, inter ili ĈeFEA sub gvidado de Ladislav Hakl. Vizitantoj de la aranĝo esprimis intereson pri prezentitaj esperantaĵoj kaj la E-movado inter fervojistoj. La plej signifa estis vizito de ministro por industrio, merkato kaj transporto s-ro Karel Havlíček kaj ĝenerala direktoro de Ĉeĥaj Fervojoj a.s. s-ro Ivan Bednárik, kiuj esprimis intereson pri nia agado.



**Ladislav KOVÁŘ**

# Eksprestrajno konektanta Eŭropon

La veturo de la *CEE (Connecting Europe Express)* finiĝis la 7-an de Oktobro 2021 post pli ol unumonata vojaĝo en Parizo. Al la celo de la










*Paris Gare de l´Est*, 07.10.2021, je la 12,40 h, Hubert Peyrouty, Líba Gabalda kaj Denise Happi-Fosso.

aranĝo ni povas rigardi el diversaj flankoj. De teknika kaj organiza vidpunkto ĝi estis interesa pro tio, ke ĝi montris, ke estas eble komplete konekti Eŭropon per fervojo. Aliflanke, por reala eluzo de tiu ĉi sperto en ĉiutaga pasaĝertrafiko tio estas iomete iluzio. Tamen, bone ke ĝi okazis kaj kelkaj el vi povis vidi la trajnon kaj observi surloke ĝian alvenon. Je mia alvoko venis interesaj fotoj, kiujn faris vi – legantoj de la Internacia Fervojisto. Al ili mi aldonis kelkajn aliajn akompanajn fotojn el diversaj lokoj.

Krom tio mi ankaŭ uzis artikolon kun diskuto de direktorino de Nederlandaj Fervojoj por prezenti oficialan opinion pri la afero.






*Gorna Orjahovica*, Bulgario, 16.09.2021 je la 17,27 h, Angel Maglov kun grupo de E-fervojistoj

## Ekspreso konektanta Eŭropon montras bonajn kaj malbonajn eŭropajn fervojojn

Post alveno de *CEE* en Amsterdamo diris ĝenerala direktorino de Nederlandaj Naciaj Fervojoj *NS* s-ino Marjan Rintel: „ El Amsterdamo ni povas veturi al Parizo kaj reen, sed dum la sama tempo ni povas veturi nur per unu direkto al Berlino. Estas grave adapti por tio nian infrastrukturon”.... „Ni devas rapide realigi konekton kun germanaj grandrapidaj fervojlinioj. Per plibonigo de la konekto havos prosperon 18 milionoj da eŭropanoj. Tio estas projektoj, kiujn ni bezonas .... Ĝi estas rakonto de la *CEE*, demando estas: ĉu ni ensaltos aŭ elsaltos?”

Mallongigita laŭ artikolo de Esther Geerts en RailTech.com, 05.10.2021

*CEE* survoje de *Lisboa* al *Vilar Formoso...*






...en *Graz*

....alvenas al *Ulm*




... antaŭ *Chambéry*.




**Ladislav KOVÁŘ,** redaktoro, fotoj *WikiMedia*

# Eŭropaj fervojoj: historio – nuntempo - estonteco



Universitato Pardubice, Fakultato de Transporta Inĝenierio
Ĉeĥa Fervojista Esperanto Asocio
invitas vin al internacia faka seminario

**EŬROPAJ FERVOJOJ:** historio – nuntempo – estonteco
**12-a Oktobro 2021, 9:00 – 14:00 h**
**Fakultato de Transporta Inĝenierio, Studentská 95, ĉambro DA 03003**

Prelegos fakuloj el Rumanio, Italio, Hungario, Danio, Germanio kaj Ĉeĥio.
Seminario estas dediĉita por studentoj kaj aliaj interesuloj pri fervojtrafiko en eŭropaj kontekstoj.

Prelegoj kaj diskutoj estos tradukitaj el Esperanto en ĉeĥan lingvon.
Partopreno estos ebla ankaŭ pere de platformo MS TEAMS, klaku ĉi tie.
Seminario okazas kadre de Eŭropa jaro de fervojo 2021.

Por aliaj informoj kontaktigu fakan garanton de Seminario: jaroslav.matuska@upce.cz.

Sub ĉi tiu titolo okazis la 12-an de Oktobro 2021 internacia faka seminario en Pardubice sur tereno de la Universitato Pardubice. La seminario – jam la dua en la vico – estis organizata de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio kaj la Universitato, Fakultato de Transporta Inĝenierio.




Konforme kun nuntempaj epidemiaj kondiĉoj la aranĝo okazis parte rekte en konstruaĵo de la fakultato kaj parte virtuale pere de retkonekto. Post enkondukaj vortoj de la ĉefa organizanto Jaroslav Matuška sekvis paroloj de prelegantoj:

Rodica Todor - prezentis IFEF kiel organizaĵon ne nur por fervojistoj, sed por ĉiuj kiuj interesiĝas pri fervojo, plue ŝi parolis pri partopreno en projekto *Erasmus +* kaj fine invitis studentojn al kunlaboro.

Tomáš Vašut (Universitato *Szeged*) – parolis pri internacia fervojtrafiko en la tempo de vaporlokomotivoj dum la aŭstria imperiado.

Jan Niemann (Danio) – prezentis kaŭzojn kaj sinsekvojn de akcidento sur danaj fervojoj sub titolo „Akcidentoj kaj epizodoj – poŝvagonoj kaj duonremorkoj”.

Guido Brandenburg (Germanio) - dediĉis sian prelegon al sekurigado

de traknivelaj pasejoj kaj la sekvo por aŭtomobilistoj kun titolo „Horoj antaŭ bariero”.

Vito Tornillo (Italio) - parolis pri nuntempaj kaj estontaj instalaĵoj en fervojo uzataj jam nuntempe kun akcento sur novaj teknologioj kun naturprotektaj celoj.

Roman Štěrba (ĉeĥa Fervojadministracio, ŝtata organizaĵo) – montris en sia prelego celojn de modernigo kaj disvolviĝo de la fervoja infrastrukturo en la Ĉeĥa Respubliko.

Andreas Diemel (Germanio) – konatigis partoprenantojn kun historio kaj nuntempo de noktaj trajnoj en Eŭropo.



En la fino de la seminario invitis Ladislav Kovář gepartoprenantojn al la 73-a IFEF kongreso en Beroun (Ĉeĥio) en la jaro 2022.

La prelegoj estis prezentataj kun sinsekva interpretado de esperanta en ĉeĥan lingvon kaj inverse.

Surloke partoprenis 18 aŭskultantoj kaj 21 en retejo sur platformo MS Teams el 9 landoj.

La seminario laŭ impresoj de la partoprenantoj estis sukcesa. Ili ankaŭ alte taksis precizan organizadon de la evento.

**Ladislav KOVÁŘ**

## Novaj lokomotivoj por Nov-Zelando




La Nov-Zelanda fervoja kompanio „*Kiwirail*” mendis de la svisa kompanio Stadler 57 dizelajn ĉefliniajn lokomotivojn por uzo plejparte en la Suda Insulo. La *CoCo* lokomotivoj konvenos por la ŝpuro 1067 mm kaj estis konstruataj en Valencio, Hispanio. La komuniko proklamis, ke “la suda insulo havas defian topografion”. Damne, la tuta Nov-Zelando havas defian topografion! Eĉ en la suda insulo troviĝas la plej granda plata tereno en la tuta lando – la ebenaĵoj de *Canterbury*... Sed en la norda insulo, kun la

absolute plej granda nombro de loĝantoj estas esperoj pri ioma elektrizado de la fervoja reto, kiu por la suda insulo apenaŭ defendeblas. La lokomotivoj venos kun konformo al la novaj eŭropaj normoj pri elfluaj gasoj – nivelo *EURO 5*, do 25% pliigo de N) kaj 30% malpli da partikla eligo. La lokomotivoj havos aŭtomatan haltigan teknologion kaj porkondukistan konsilan sistemon. Nova diagnoza sistemo donos al la fervoja kompanio informojn pri la stato de brulaĵujo kaj baterio, pri suma energiuzo kaj pliajn mezurojn pri la lokomotivo. La Suda Insulo havas 65 dizelajn lokomotivojn, kun averaĝa aĝo de 47 jaroj – ja multaj ricevis renovigon, sed per eksdata teknologio el la sepdekaj jaroj. Tempo por io nova!

**Stefan MacGill**

## Trajno sen kondukisto prezentita sur *Hamburg S-Bahn*

*Deutsche Bahn* kaj *Siemens Mobility* prezentis en stacio *Dammtor* en Hamburgo la unuan *S-Bahn* trajnon ekipitan por aŭtomata trafiko.

Enkadre de programo *Digital S-Bahn Hamburg* kiu kunigas urbo-gvidantaron, *DB* kaj *Siemens Mobility* estis la orienta sekcio de linio *S21* inter *Berliner Tor* kaj *Aumühle* ekipita per sistemo *ETCS Level 2* regata el ekzistanta elektronika regejo kaj nova radioblok-centrejo en *Bergedorf.* Kvar motorvagonaroj *EMU* tipo 474 konstruitaj de *Bombardier* estas ekipitaj per *ATO* (Aŭtomata trajngvidado) sistemo tra la *ETCS* sistemo, kio ebligas trafikon sur nivelo 2 de aŭtomatizado. La instalaĵo *ATO* estas enkonstruita en konteneron sub trajno por ŝpari spacon kaj malgrandigi aldonajn konstru-laborojn.




La gvidanto de la projekto *DB* Schröder akcentis, ke la aplikaĵo *ATO* tra *ETCS* estas taŭga por trafiko kun miksita transporto uzante „malfermitajn interfacojn bazitajn sur eŭropaj normoj”. Tio ebligus ekfunkciigon de la teknologio en ĉio ajn – de *S-Bahn* trajno ĝis grandrapida vagonaro *ICE* „sendepende de trajntipo kaj liniokondiĉoj”. Li kredas, ke tio signifas gravan subtenon por fervojtrafiko kaj potencan

kontribuaĵon por transiro al mobiliteco.

La ĉefdirektoro de la kompanio *Siemens Mobility* Michael Peter diris al redaktoro de *Railway Gazette International*, ke la instalaĵo *ATO* estis komplete aprobita de federacia fervojoficejo *Eisenbahn-Bundesamt* kaj „povus esti morgaŭ ekfunkciigata” en kia ajn fervojreto, kiu havas *ETCS*. „Uzado de normumitaj interfacoj kaj trajnoj de aliaj produktantoj dokumentis plenan interkonvenecon de ĉi tiu teknologio” diris Peter kaj aludis, ke oni „proponis gravan paŝon antaŭen en la agadkampo de energia efikeco, kapacito kaj kvalito de servoj.

Dum la prezentado planas la kompanioj *DB* kaj *Siemens* trafiki per du eksperimentaj trajnoj dumtage inter *Dammtor* kaj *Bergedorf*, kiuj montros al partoprenantoj kaj eventualaj klientoj *ATO*-on kaj la *Ideenzug*-koncepton por venonta generacio de regionaj trajnoj.

**Ladislav Kovář,** laŭ artikolo en *Metro Report International*, 11.10.2021

## Malfacilaĵoj pri rezervado de internacia trajnbileto

La famo de internaciaj vojaĝbiletoj por trajnoj ne estas tiel pozitiva, kiel ĝi povus esti. Internaciaj trajnbiletoj estas rigardataj kiel multekostaj kaj malfacile rezerveblaj. En realeco ili povas esti nekredeble mal-multekostaj, sed ekzistas problemoj pri ilia troveblo.

Nunjare septembre mi vojaĝis el Kopenhago al nederlanda *Amersfoort* po 34,30 €. Tio montras, ke en realeco estas eble trovi malmultekostan internacian trajnbileton. Antaŭ *Covid-19* mi vojaĝis per *Eurostar* kun forveturo je la 17.19 h el *St. Pancras* en Londono al *Amersfoort* dufoje po 48 €. Aviadilo en tiu tempo inter Londono kaj Amsterdamo kostis minimume 200 €. Pliajn 200 € estus necese aldoni al kostoj por veturo el centro de Londono al flughaveno kaj kostoj por vojaĝo de amsterdama flughaveno al *Amersfoort*.

Problemo estas en tio, ke multaj homoj ne konscias pri ĉi tiuj eblecoj kaj ne kapablas trovi retpaĝaron, kie ili trovos tiujn malmultekostajn vojaĝbiletojn. Homoj kun fakaj konoj uzas aplikaĵon *DB-Navigator* aŭ retpaĝaron *Trainline*.

Kelkaj freŝdataj ekzemploj de homoj kiujn mi konas:

- Politikistino kiu preferas vojaĝadon per trajno, provis mendi veturbileton en trajno el Hago al Romo por libertempi kun sia familio. Ŝi

ne sukcesis trovi trajnbiletojn. Ŝi vojaĝis aviadile.

- Mia kuzino, klera damo, estis petata paroli dum konferenco en Dresdeno. Daŭris duontagon ĝis ŝi mendis vojaĝbileton el sia naskiĝurbo *Jist* en *Friesland* al Dresdeno. Ŝi ne sciis, ke per frua mendo ŝi povus ŝpari multe da mono, tial ŝi pagis tro multe.
- La trajno *Connecting Europe Express* veturis dimanĉe la 3-an de Oktobro el *Bad Bentheim* al Amsterdamo. Direktoroj kaj laborantoj de kompanio *ProRail* kaj *NS* estis invititaj kunveturi. Ĉiuj tiuj homoj estas spertaj trajnvojaĝantoj, kiuj eĉ sciis kiamaniere akiri bileton al nederlanda limstacio *Hengelo*. Sed kiamaniere aĉeti bileton el *Hengelo* al *Bad Bentheim*? Tio montriĝis tiel komplika, ke ĉiu pagis alian prezon inter 5 ĝi 20 € por la sama mallonga sekcio inter du limstacioj.

Se fervojentreprenoj sukcesus solvi ĉi tiun problemon per maniero komplezema al la vojaĝantoj, la nombro de vojaĝantoj en internaciaj trajnoj duobligus dum mallonga tempo.

**Arriën KRUYT** (membro de administra konsilantaro de Eŭropa Federacio de Vojaĝantoj), artikolo en RailTech.com, 19.10.2021, tradukis Ladislav KOVÁŘ

## Jarkunveno de ĈeFEA



Komence de Oktobro 2021, okazis en *Beroun*, hotelo *Grand*, forŝovita jar-konferenco de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio. La loko ne estis elektita hazarde – venontjare ĉi tie okazos la 73-a IFEF-kongreso. Ĉefa tasko de la jarkunveno estis elekto de nova estraro, aprobo de nova statuto kaj konatiĝo kun la medio de la venonta kongreso.

Kiel nova prezidanto estis elektita s-ro Ladislav Hakl, lia unua grava tasko estis transdoni al la antaŭa prezidanto Jindřich Tomíšek diplomon de „Honora membro” de ĈeFEA. La estraro de la asocio volis tiamaniere aprezi multajaran, ofereman kaj fruktodonan laboron de s-ro Tomíšek ne nur por la asocio, sed ankaŭ por lia senlaca aktivado en internacia E-movado ene de IFEF.

**Ladislav KOVÁŘ**

## IF 2021.1

Novjara mesaĝo de la prezidantino de IFEF 2
Forpasis CECI Pasqual 4
72-a IFK – alia kongreso 4
Anonco pri elektoj dum la jaro 2021 en IFEF 5
Gvidanto de la Faka Komisiono 6
Alvoko al ĉiutaga komunikado 6
Nova fervoja prov-instalaĵo malfermiĝos en Anglio 7
Trajnoj kaj busoj senpagaj 12
Eŭropa parlamento aprobis Eŭropan jaron de fervojo 2021 13
Usona Fervojasocio 14
Ankaŭ ĉe FFEA okazis unua fojo 16
Interreta psikologia konsilado dum la pandemio de *Covid-19* 17
IFEF membro helpas dum koronvirusa pandemio 18
Honorigitaj membroj 20

## IF 2021.2

Transponta Kongreso – ĉu aŭ se jes kiel? 24
Tagordo de publika komitatkunveno 25
Tagordo por la kunveno de FK 26
Raporto de la kasisto pri la jaro 2020 27
Raporto de la IFEF-ĉefkomitatano pri la jaro 2020 29
Raporto de la redaktoro 30
Grava perdo por ĉeĥaj esperantistoj 31
Zlatko Hinšt, biografio 32
Ladislav Hakl, biografio 33
Terminara laboro 34
Potenco de televidkomunikiloj 35
La Marborda Linio *Helsingør* – Kopenhago … kaj pli 38

## IF 2021.3

Kaj nun? 44
Lucien De SUTTER, 08.09.1924 -17.02.2021 44
D-ro Antonio De SALVO, Romo 08.06.1942-21.03.2021 45
Milada DOBŘICKÁ,12.02.1948 – 16.02.2021 46
Jarraporto de la sekretario pri la jaro 2020 46
IFEF en IRIS 52
La unua rumano kiu veturis per trajno antaŭ 190 jaroj 53
La trajno iras, kaj nin kunportas 56
Nova trajnservo lanĉita en Nov-Zelando 59

## IF 2021.4

Salutvortoj de IFEF-prezidantino okaze de la 72-a IFK 64
La 72-a IFK estas historio – kia ĝi estis? 65
Anonco: 72-a IFK nedisponitaj antaŭpagoj 67
Resumoj de fakaj prelegoj dum la 72-a IFK 67
Dumkongresa kunveno de FK 70
Kiamaniere esti bona membro de IFEF 71
La nova kaj unua klimatizata stacidomo en Barato 72
Nov-Zelando: novaj lokomotivoj kaj vagon-kunmetaĵoj 73
La milito 1914-1918 – fervoja milito 74
„Slovaka raketo” denove sur reloj 80

## IF 2021.5

Protokolo pri publika komitatkunsido 84
IFEF en la 2-a Virtuala Universala Kongreso 92
Nova tasko por la Laborgrupo pri historio 93
Evoluo de la trajnaj vojaĝeblecoj ... 94
La Eŭropa jaro de fervojo 96
Hungario enkondukas tram-trajnon 99
Amuza anguleto 100

## IF 2021.6

Resuma jarraporto de l.a. pri la jaro 2020 104
*Connecting Europe Express* 108
Bonveno al la 73-a IFK en *Beroun* 110
Tago de fervojo 2021 de Ĉeĥaj Fervojoj 111
Eksprestrajno konektanta Eŭropon 112
Eŭropaj fervojoj: historio-nuntempo... 115
Novaj lokomotivoj por Nov-Zelando 116
Trajno sen kondukisto 117
Malfacilaĵoj pri rezervado de internacia trajno 118
Jarkunveno de la ĈeFEA 119
Enhavo 2021 120